

& La nigra rajdanto:

< Rekante 16 el 32 batoj por strofo, entute 384 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis K. Kalocsay (Streĉita kordo, 1931). Baladigis Martin Strid (2016) per feroaj melodio kaj rekantaĵo de & Olav Rajdistrozo.>

(#Melodio:

<2,3:4> (o;mi /mi mi mi mi /so solfa mi i; /soso sofa mi i;mi /mi mi re re /mi milre do lTi; /LaTi dore mimi mire; /dodo dore mi mire /do Ti do)×12)+

(& Strofoj:

'1 Ĉe l' /vojo: fulga /trab' de2 dom',

(×; – /**Karbo kaj forĝist'** – ;)

Post /arb' rikanas /ostfa2nto2m'.

(×; /**Junaj viroj, viglaj viroj! ; /Iru plankon, dancu kun /granda em'!**)

'2 En la plumbe peza noktsilent'

Nur foje ĝemas branĉo pro vent'

'3 Kaj en droniga glua kot' Jen kuras en freneza trot'

'4 Ĉevalo nigra tra l' malhel',

Rajdanto nigra en la sel'.

'5 Ĉe l' vojo: fulga trab' de dom',

Post arb' rikanas ostfantom'.

'6 Sub kasko: vizaĝ' en morta pal',

En sango glitas huf' de ĉeval'.

'7 "Rajdanto! Kien la rapid'?"

Respondas moke raŭka rid'.

'8 "Rajdant'! La hejmo jam ruin'!

Rajdant'! Revokas vin patrin'!

'9 Rajdant'! Postploras vin infan'!"

"Forblovas flokojn uragan'!"

'10 "Sed kia cel', do kia cel'?"

Respond' ne venas el la sel'.

'11 Klinita kap', freneza trot',

En drona, glua, sanga kot'

'12 Glitadas hufo de ĉeval'

Okuloj vitraj, morta pal'.